

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



12

SOFIA — DECEMBRO 1961

E N H A V O

	Paĝo
* * * — L. L. Zamenhof	1
A. L. — Kvardek sesa Universala Kongreso de Esperanto	4
* * * — Letero de Bulgara Esperantista Asocio al UEA	5
Simeon Ĥesapĉiev — Somera Esperanto-Tendaro	7
Grigorio Smirnenski — Karl Liebknecht	9
H. P. — Letero el Germana Federacia Respubliko	10
Gustav Nilsson — Letero el Svedio	11
* * * — За председателите и касиерите	12
ORGANIZA VIVO	14
NI RECENZAS	17

Abonkotizo: jara — 14 levoj, duonjara — 7 lv. Por eksterlando — 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro.

Reklamtarifo: 5 levoj por cm²; korespondanoncoj: 0,5 levoj por linvorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovertpaĝo — 1000 lv.

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANO: Ing. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23-Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bucureşti 5

SOVETUNIO: J. Kudrjavickij, PK 1255 Moskva K-9.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.

Frontpaĝa bildo: Monumento „Esperanto“ en Vitoŝa



L. L. ZAMENHOV

L. L. Zamenhof estas naskita la 15-an de decembro 1859. Multaj scias, kio instigis lin labori sur projekto de internacia lingvo.

Kiamaniere la juna Zamenhof ekinteresiĝis pri la demando de lingvo internacia, neniu historiisto pli bone rakontas ol li mem en sia rimarkinda „Letero pri la deveno de Esperanto“, kiun li ruse skribis al N. Borovko.

„La ideo, al kies efektiviĝo mi dediĉis mian tutan vivon aperis ĉe mi en la plej frua infaneco kaj de tiu ĉi tempo neniam min forlasis: mi vivis kun ĝi kaj eĉ ne povas imagi min sen ĝi.“

En Bjalistoko la loĝantaro konsistas el kvar diversaj elementoj: rusoj, poloj, germanoj kaj hebreoj. Ĉiu el tiuj ĉi elementoj parolas apartan lingvon kaj neamike rilatas la aliajn elementojn. En tiu urbo pli ol ie la impresema naturo sentas la multĉezan malfeliĉon de diverslingveco.

Estante bonkora knabeto, lin dolorigis la fremdeco inter la loĝantoj de la sama lando. Li suferis pro la malamo en la tuta mondo. En lia pensema kapeto formiĝis plano kaj volo, ke li nepre forigu ĉi malbonon.

Diversajn utopiajn revojn li forjetis sed unu ĉefa restis por li ĉiam. Ĝi estis la ideo pri kreo de unueca homa lingvo.

En la cerbo de la juna Zamenhof disvolviĝis tiu bildo kun frapa precizeco. Li revis rompi la murojn inter la popoloj. „Malamikeco de la nacioj falu, falu, jam tempo estas. La tuta homaro devas unuigi en unu familion“ — versas li en la gimnazio.

Kiel gimnaziano Zamenhof pensas pli kaj pli pri la malriĉaj homoj, pri laboristoj. En rondo familia li ŝatis laŭte legi versaĵojn de la granda rusa poeto, revolucia demokrato Nekrasov. Loĝante en kvartaloj de malriĉuloj, li penetris en la animon de la popolo. Li konvinkiĝis, ke la tuta mondo malriĉula sopiras al paco kaj progreso.

Zamenhof studadis en Moskvo kaj Varsovio, veturis Vienon por specialiĝi kiel okulisto. En tiuj ĉi grandurboj li ekkonis la laboristan movadon, kies devizo fariĝis: „Tutmondaj proletoj unuigu vin!“

Li ĝojis ofte, ke li kreis lingvon, kiu helpas la liberigan batalon de la laboristaro.

Samtempe krom la solvo de la lingva problemo, aliaj pensoj okupis Zamenhof en tiuj jaroj. Lia patrino estis pia, lia patro estis ateisto. Li mem ankoraŭ kiel knabo perdis la fidon je la juda religio. Lia logiko ne permesis al li kredi la predikojn de hipokritaj pastroj. Li ne vidis ian sencon en la vivo. Ĉio ŝajnis al li vana kaj naŭza. Li kreis propran kredon pri vivo kaj morto, kiun li nomis „Homaranismo“.

Kiaj faktoroj formis la kredon, filozofion de Zamenhof? Dum sia juneco li fervore legis ĉiujn novajn verkojn de Tolstoj, kies famo disvastiĝis

tra la mondo. Al Zamenhof treege placiis la alvoko de Tolstoj al amo kaj fratiĝo. Zamenhof malkovris, ke la idealo de Tolstoj estas simila al la idealo, por kiu li mem sopiras ek de infanaĝo. Kun granda amo Zamenhof legis ankaŭ pri la vivo kaj predikoj de la fama klerulo el antikva Palestino Hilel, kiu vivis en Jerusalemo en la lastaj jaroj antaŭ nia erao. Dolca kaj humila karaktere, la maljuna pensulo predikis amon, pacon, memperfektiĝon. Zamenhof verkis en rusa lingvo broŝuron, titolitan „Hilelismo“, kiu tamen ne vekis intereson.

Poste li verkis novan broŝureton sub titolo „Homaranismo“. En la antaŭparolo li klarigis:

„La homaranismo estas instruo, kiu ne deŝirante la homon de lia natura patrujo, nek de lia lingvo, nek de lia religiano, donas al li eblon eviti ĉian malverecon kaj kontraŭparolojn en siaj naciaj-religiaj principoj kaj komuniĝadi kun la homoj de ĉiuj lingvoj kaj religioj sur fundamento neŭtrale homa, sur principoj de reciproka frateco, egaleco kaj justeco.

Zamenhof ofte nomis sin libercreda, ĉar lia religio celis interpaciĝi ĉiujn religiojn. Zamenhof rigardis la diversajn homajn religiojn kvazaŭ malsamajn vestojn de la sama vero.

Provoj de Zamenhof adapti sian religion al la klasa socio plene fiaskis. Lia sindediĉo al la religion parolas pri tio, ke Zamenhof komprenis nek la leĝojn de la kapitalismo, nek la leĝojn en la naturo. Malmultaj dum lia epoko kapablis tion. La scienco en la 19-a jarcento ne povis klarigi multajn leĝojn de la naturo. Pro tio la religiaj konceptoj daŭre superregis la cerbojn de multaj scienculoj. Zamenhof ankaŭ estis kredinta ĝn la ekzisto de supernaturaj fortoj. En sia poemo „Preĝo sub la verda standardo“ li ĝin imagas al si tiel:

*Al vi, ho potenca senkorpa mistero,
Fortego la mondon reganta. . .
Al vi, kiun ĉiuj malsame prezentas,
Sed ĉiuj egale en koro vin sentas. . .
Hodiaŭ ri preĝas.*

Iom' post iom Zamenhof mem konvinkiĝis, ke lia homaranismo estas ne-realigebla. Tiam li esperis, ke Esperanto servos kiel rimedon al kunfratiĝo de la popoloj. Li kantis:

*Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondan familion.*

Zamenhof imagis al si, ke Esperanto povus servi kiel paciga lingvo en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si ankaŭ pro sia lingva malsameco. Tia lando sur la Balkanio estis Makedonio. Oni proponis Esperanton kiel oficialan lingvon en sendependa Makedonio. En tiu lando loĝas makedonoj, bulgaroj, serboj, albanoj, grekoj. Por eviti ŝaluzon de la diversaj loĝantoj kontraŭ la ajn oficiala lingvo, oni proponis Esperanton, naive supozante, ke la intergenta malamo ekzistas dank' al la lingva diverseco. Ni, balkanioj, tre bone sciis, ke Makedonio estiĝis „pomo de la malamo“ nur pro la aspiroj de bulgara, serba kaj greka burĝaroj kaj la intrigoj de la impetivisma diplomatio.

Cara Rusio estis vera infero por la gentoj kaj popoloj, kiuj loĝis en ĝi. Malamo kreskis inter la gentoj. Mizero kaj malsato regis. Tamen la Partio



de la Komunistoj organizis la subprematojn, kiuj en 1917 renversis la ekspluatistojn ne per preĝoj kaj humilo, sed per armiloj. La Partio de Lenin forigis la klasan antagonismon ne per rusa lingvo, sed per konstruo de socialismo.

Do la vivo konfirmis, ke la lingvo ne povas plenumi alian funkcion krom la komunikan. Ni do faru la konkludon: Esperanto estas nur interligilo. Ĝi havas nenion komunan kun iu politika doktrino.

Ankaŭ nun ekzistas pseudoscienculoj, kiuj asertas pri plena senbazeco de artefaritaj lingvoj. Ĉu oni povas taksu tian aserton kiel seriozan! La vivo refutas ilin. Al la epoko de socialismo kaj naciliberegaj revolucioj, kiu naskas amasajn internaciajn movadojn (laboristaj, virinaj, junularaj), al la epoko de la kosma scienco, — korespondas la internacia lingvo Esperanto.

La historio de la homaro jam konas ekzemplojn de larĝa apliko de helplingvo por interŝtataj rilatoj. La sanskrita lingvo estis aplikata en diverslingva Hindio. Sudamerikaj popoloj uzis en mezepoko la lingvon „Lingua brazilika“. En ekstrema Oriento oni uzis la ĉinan literaturan lingvon. Nuntempe dekoj da nerusaj popoloj kaj gentoj uzas la rusan lingvon kiel hel-pilon. Kiel ne ekzistu ankaŭ unu internacia lingvo?

Ala nia nova epoko Zamenhof proponis lingvon, kiu estas bazita sur internacia radikaro. Ĝi estas simpla, racie konstruita. Samtempe ĝi estas riĉa, esprimanta ĉiujn nuancojn de la homa penso.

En la „Universala vortaro“ ni trovas 2574 vortojn. Preskaŭ ĉiuj ili prezentas modernajn formojn de antikvaj hindo-eŭropaj radikoj, 516 estas komunaj al ĉiuj modernaj lingvoj de hindo-eŭropa familio. Tio estas terminoj preelpe kun greka etimologio, 405 aliaj sciencaj terminoj, samgrade internaciaj, havas latinan etimologion. 559 apartenas al moderna franca lingvo, 404 estas komunaj al franca kaj angla, 138 apartenas al moderna germana lingvo, 33 apartenas al la rusa.

En 1908 aperis suplemento al la „universala vortaro“. 40% el la novaj vortoj apartenas al la hispana lingvo, 5% — al la itala lingvo, 14% — al la rusa lingvo, 14% — al la pola lingvo. La saman bildon oni vidas en la dua suplemento, oficialigita de la akademio.

Esperanto, do, estas nova hinda-eŭropa lingvo, bazita sur la roman-germanaj elementoj. Plua evoluo de Esperanto pruvas, ke ĝi ensorbas en si ĉiam pli kaj pli la internacian radikaron. Jen kiel Zamenhof prezentis al si la evoluon de la lingvo: „Malnovaj folioj falas, novaj prenas ilian lokon. Branĉoj aldoniĝas. Floroj kaj fruktoj plimultiĝas. La trunko mem grandiĝas. Sed la arbo restas unu sama.“

Tia estas la Zamenhof-a Esperanto.

La ĝisnuna evoluo de Esperanto pruvas, ke ĝi estas taŭga lingvo por la tuta homaro. Tion konstatis diverslandaj scienculoj dum internaciaj lingvaj kongresoj. Interalie la Soveta Registaro tuj post la civilmilito elektis komisionon por ekzameni la problemon. Fine ĝi decidis rekomendi la instruadon de Esperanto en USSR.

Krei vivkapablan artefaritan lingvon estas vera invento. La Soveta Registaro sub la prezido de Lenin aprobis Esperanton. Tio estis granda honoro por ĝia aŭtoro. Zamenhof aŭtiris la dankemon de la tuta homaro. Lia nomo eterne brilos en la historio de la homa kulturo.

Por ni, esperantistoj, Zamenhof ne estas nur genia inventisto. Ni gloras lin ankaŭ kiel granda batalanto kontraŭ la ŝovinismo kaj milito. Neforgeseblaj estas la vortoj, per kiuj li sin turnis al la naciistoj:

„Vi, nigraj semantoj de malpaco, parolu nur pri malamo al ĉio, kio ne estas via; parolu pri egoismo, sed neniam uzu la vorton „amo“, ĉar en via buŝo la sankta vorto malpurigaŝas.“

Estante sincera pacbatalanto, Zamenhof verkis en 1915 sian faman „Letero al la diplomatio“. Li alvokis la diplomatojn per jenaj vortoj:

„Ĉu vi komencos simple refaradi kaj flikadi la mapon de Eŭropo? Ĉu vi simple decidus, ke la terpeco „A“ devas aparteni al la gento „X“, kaj la terpeco „B“ al la gento „Y“?“

Neniu el la tiamaĵ diplomatoj havis tempon legi ĉi leteron de Zamenhof, kvankam li sincere batalis kontraŭ la milito, la rezulto estis nulo. La kaŭzoj estas multaj, sed la ĉefa — li flanken staris de la laborista movado. Li vere simpatilis al la laboristoj, sed restis indiferenta koncerne ilian ideologion. Dum Lenin kolektis la fidelajn al marksismo fortojn por revolucia batalo kontraŭ la imperiismaj militoj, Zamenhof dissendis leterojn al la diplomatoj.

Kiel pacifisto Zamenhof batalis por la paco inter la popoloj, pledis por „eterna paco“, sed li ne batalis konkrete kontraŭ la fortoj, kiuj kaŭzas la imperiismajn militojn.

Zamenhof ne komprenis la sciencan koncepton pri la militoj. La konceptoj de marksistoj pri la paco kaj milito estas tute aliaj ol tiuj de la pacifistoj.

Kvankam la pacifista movado estis forta, ĝi ne povis malhelpi du imperiismajn militojn, kiuj kostis la vivon de milionoj da homoj. Nun la bona parto de la pacifistoj subtenas la mondan movadon por paco, kunlaboras kun la laborista klaso kontraŭ la imperiismo kaj koloniismo. Kiel grandan batalanton por paco kaj feliĉo de la homaro ni devas glorigi d-ron L. L. Zamenhof, neniam forgesante, ke lia filozofio estis abstrakta.

Neniam ni devas forgesi, ke la lingvo, kiun li donacis al la homaro, venkos komplete nur kiam pereos imperiismo kaj koloniismo.

Kiamaniere ni, bulgaraj esperantistoj, venigos la tagon, kiam ni entombigos la kadavron de la kapitalo? — Ĉi revo efektiviĝos, se ni tuforte helpas la planojn de la socialisma konstruado en nia lando, la iniciatojn de la Soveta Registaro pri reguligo de la aferoj en Eŭropo kaj en la mondo.

Nur la komunisma socio malebligos por ĉiam la militojn.

Al senlaca batalo por triumfo de la komunismo, enmetante nian brikon en la mondkonstruaĵo de la socialismaj ŝtatoj!

KVARDEK SESA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

La 46-a Universala Kongreso de Esperanto okazis de la 7-a ĝis la 12-a de aŭgusto 1961 en la ĉarma brita urbo Harrogate (Har'ogejt). Partoprenis 1 700 gekongresanoj el 35 landoj. La kongreson prezidis prof. Hideo Jogy (Japanio).

La kongreso okazis en tempo, kiam la pacamaj fortoj en la mondo kaj la tuta socialisma tendaro ĉefrunte kun Sovet-Unio batalas kaj strebas por evito de nova mondmilito, por ĝenerala senarmigo, por paca kunekzistado de la ŝtatoj kaj popoloj kun malsamaj poli-

তিকaj kaj sociaj sistemoj. Nome, tiu ĉi atmosfero ĝis certa grado influis la laboron nur de kelkaj fakunsidoj. La tuta laboro de la kongreso tamen iris laŭ la jam konata linio de neŭtraleco: stari flanken de la plej aktualaj kaj akraj problemoj de nia epoko.

La pure esperantaj arangoj de la kongreso ĉi-jare plene sukcesis kaj sendube donos novan impulson kaj forton al la esperantistoj kaj la organizita Esperanto-movado en la tuta mondo.

Oni devas speciale mencii pri la bona arango de la Unua Arta Festivalo, la Somera Universitato, la Infana Kongreseto kaj multaj fakaj kunvenoj de aliĝintaj al UEA internaciaj fakaj Esperanto-organizaĵoj. En la MEM-kunveno, kiun prezidis la fama esperanta poeto kaj batalanto por paco Julio Baghy (Hungario) estis pridiskutita la

raporto de C. Fielding (Britlando). La plejmulto el la parolintoj substrekis, ke la esperantistoj devas pli aktive partopreni en la batalo por paco kaj praktike uzi la internacian lingvon por tiu nobla celo.

Serioza laboro estis farita ankaŭ dum la Ĝeneralaj Kunvenoj de UEA, en la Seminario Okcidento-Oriento k. a. Kelkaj bone organizitaj ekskursoj al diversaj belaj regionoj de Britlando plezurigis la gekongresanojn kaj kunhelpis, ke ili havu pli ĝustan kaj plenan impreson pri la beleco de la kongreslando.

Apartan dankon meritas ĉiuj anoj de la Loka Kongresa Komitato kaj ties nelacigebla prezidanto Hamilton, kiuj faris ĉion eblan por la modela organizo de la kongreso.

A. L.

BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Sofia, la 13-an de novembro, 1961

Al S-ro Prof. D-ro Ivo Lapenna
77, Grasmere Avenue
Wembley, Mdssx, Britlando

Kopioj al:

Harry Holmes, vicprezidanto kaj
aganta prezidanto de UEA

Andrej Rajski, estrarano pri landaj
asocioj

KKS en CO de UEA

Kara samideano Lapenna,

Ni resendas laŭ via deziro, esprimita en via lasta letero de la 21-a de oktobro 1961, la reviziitan en aŭgusto 1961 kongresan regularon de UEA subskribita de la prezidantoj de Bulgara Esperantista Asocio kaj de Sofia Esperanto-Societo „M. Gorkij“.

La unuan inviton pri la 48-kongreso de UEA ni direktis je la 27-a de januaro 1961. La 27-an de februaro

1961 per leteroj n-roj 105 kaj 106, responde al via letero de la 10-a de februaro j. k., ni denove konfirmis la inviton, deklarante, ke ni konsentas kun la postuloj de la Kongresa Regularo kaj alsendante:

1. Tradukon de la decido de la Ministraro de Popola Respubliko Bulgario n-ro 291, per kiu la Ministraro aprobas la okazigon de la 48-a UK de Esperanto en Sofio sub la protekto de la Prezidanto de la Ministraro;

2. Oficialan inviton de la Sofia Esperanto-Societo „M. Gorkij“;

3. Responditan demandaron.

La vicprezidanto de BEA Atanas Lakov, kiu partoprenis la komitatajn kunsidojn dum la UK en Harrogate informis nin pri la ŝanĝoj de la Kongresa Regularo. Per letero n-ro 403 de la 18-a oktobro 1961 ni trian fojon konfirmis nian inviton kaj ni deklaris nian konsenton kun la ŝanĝoj de la Kongresa Regularo, faritaj en Harrogate.

En via lasta letero vi insistas pri respondo al via letero de la 19-a de aprilo. Gi entenas du ĉefajn demandojn: 1) pri la kontoj inter UEA kaj LKK; 2) pri la nombro de la individuaj membroj.

La unua demando en via letero fakte estas detaligita per ekzemploj postulo de korespondaj paragrafoj de la Kongresa Regularo kaj per nia deklaro pri konsento kun tiuj paragrafoj kaj kun la tuta Kongresa Regularo ni konsideras la demandon respondita kaj elĉerpita.

La demando pri pligrandigo de la nombro de la individuaj membroj estas eksterregulara kaj ne havas rektan rilaton al la invito kaj la okazigo de UK. En sia letero de la 5-a de aprilo j. k., Sofia Esperanto-Societo „M. Gorkij“ klarigas al vi niajn malfacilaĵojn tiurilate. Anstataŭ tio ni pligrandigas la nombron de la asociaj membroj kiuj dum la kuranta jaro atingis 3 200 kaj verŝajne dum la venonta jaro ili estos ankoraŭ pli. Individuajn membrojn ni havas ĉirkaŭ 70. Kaj por kontentigi vian deziron por plimultigo de la lastaj la Estraro de BEA en sia lasta kunsido decidis plimultigi la nombron de la individuaj membroj dum 1962 jene: 150 MA kaj 150 MJ. Sed por tio la CO devas krediti nin ĝis la okazonta en Sofio UK, ĉar malgraŭ niaj klopodoj ni ne havas eblon pagi en fremda valuto tian kroman sumon. La CO de

UEA havos la eblon deteni la sumon el la enspezoj de LKK. Al tlu ĉi propono ni atendas nian respondon por komenci varbi novajn membrojn.

Kara amiko, vi devas bone kompreni tiel niajn malfacilaĵojn tiurilate, kiel ankaŭ nian fortan strebon plenumi ĉiujn viajn postulojn kaj sugestojn. Vi scias, ke en la pasintaj jaroj ni havis grandan ŝuldon al UEA, kiun kun streĉaj klopodoj ni tute likvidis. Kaj nun niaj kontrilatoj estas tute regulaj. Sed vi ne devas postuli de ni novajn ŝarĝojn, kiuj nun estas ekster niaj ebloj kaj kiuj estas antaŭviditaj nek en la statuto de UEA, nek en la Kongresa Regularo.

Ni denove atentigas, ke ekzistas ĉiuj subjektivaj kaj objektivaj kondiĉoj en Sofio por okazigo de unu el la plej bone organizitaj kaj fruktodonaj kongresoj. Tion deklaras ĉiuj okcidentlandaj esperantistoj, kiuj abunde vizitas nian landon. La malmultekosta vivo, la pitoreska naturo, la agrabla klimato, la forta landa Esperanto-movado, la tre favora rilato de la aŭtoritatoj, certigos ĝuan restadon al la gekongresanoj, brilan sukceson de la kongresaj arangoj, tre efikan propagandon tiel en landa, kiel en internacia skalo.

Konsiderante tiujn ĉi faktorojn, kiujn neniu bondeziranto de nia movado povas preterlasi kaj ankaŭ la fakton, ke tre malofte en Orienta Eŭropo okazas kongresoj, ni estas certaj, ke la Estraro de UEA prenos favoran decidon kaj ni povos baldaŭ sciigi al la tutmonda esperantistaro la ĝojigan por ĝi novaĵon pri okazigo de Universala Kongreso de Esperanto en 1963 en Sofio.

Akceptu, ni petas, niajn elkorajn salutojn!

Sekretario: Violin Oljanov

Prezidanto: Hristo Gorov

SOMERA ESPERANTA TENDARO

La esperantistoj konas la Esperantodomon en kastelo Gresillon (Francio), kie ĉiujare oni gvidas kursojn kaj organizas prelegojn por la esperantistoj de multaj landoj.

La bulgaraj esperantistoj jam ankaŭ havas sian Gresillon, la tendaron apud la belega montara vilaĝo Druĵevo (800 m super la marnivelo).

Se oni veturas per aŭtobuso de Sofio al Vraca kaj Vârșec, oni devas pasi tra Lakatnik ĉe rivero Iskâr kaj post suprenveturado de 15 kilometroj oni jam estos en Druĵevo.

Kiam antaŭ tri jaroj aŭ pli k-do Cifudov parolis, ke la Bulgara esperantista kooperativo ricevos parcelon proksime de vilaĝo Druĵevo kaj tie organizos somerumadon, multaj ridetis skeptike. Dum la somero de 1960 la kooperativo organizis tie somerumadon de negranda grupo da esperantistoj kaj dum 1961 (de la 23-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto) la Bulgara esperantista asocio organizis du somerajn kursojn de Esperanto — unu kurson gvidis k-do Georgi Dimov el Varna (laŭ la rekta metodo), alian gvidis mi (laŭ la miksitata metodo, ĉe kiu en la komenco mi insistis pli multe pri la praktika parolado kaj iom post iom transiras ankaŭ al la teorio).

Ĉe ĉiu el ni estis efektive po du kursoj — unu por komencantoj. Al ili ni



instruis la lingvon elemente, kaj la ceteraj partoprenantoj estis staĝantoj — al ili ni instruis la instrumentodon. Post ĉiu leciono ni havis teorian (pedagogian) konferencon, en kiu oni pridis-kutadis en detaloj la instrumaterialon. Iom post iom la staĝantoj partoprenis en la instruado. Foje mi donis al iuj el ili ripeti malgrandan parton de la leciono. Poste ili mem faris lecionojn, instruante diversajn partojn de la lernmaterialo. Iliaj lecionoj estis bone preparataj kun pli aŭ malpli granda helpo fare de la kursgvidantoj. La staĝantoj ne nur utiligis la manierojn de la gvidantoj, sed kelkfoje montrigis tre inventemaj, ligante la instruadon kun la konkretaj ĉirkonstancoj en la tendaro en la momento kaj trovante tre trafajn ekzemplojn — objektojn, personojn, agojn ktp.

Multaj el la partoprenantoj estis instruistoj kaj tial la pedagogiaj konferencoj pasis ĉe tre alta teoria nivelo, multaj montris grandan pedagogian lertecon. Bonajn lecionojn faris k-do Jordan Atanasov (el Polso Kosovo), Stojan Popov (el Kabile), Nikola Mladenov (el Sofio, kiu estas laŭdinda, ĉar li ne estas instruisto, sed kompostisto kaj montris pedagogian majstecon), Šterjo Kukuŝev (el Peŝtera), Milka Popova (el Polso Trâmbeŝ) ka.

En la fino de la kursoj ni faris ekzamenojn. El 57 personoj, kiuj partoprenis la kursojn, prezentis sin porekzameno 37 personoj. La plimulto el ili aspiris al la grado pri „instrukapablo“. Multaj tro alte kaj nereale taksis siajn kapablojn. 26 personoj ricevis

ateston pri instrukapablo, 8 pri posedo de la lingvo, 3 por elementa posedo de la lingvo. Speciale distingigis du junulinoj (ankoraŭ gimnazianinoj) — Petja Kraĉeva el Jambol kaj Donka Stojanova Petkova el Loveĉ. Ili ricevis ateston pri instrukapablo. Modestecon montris k-do Ivan Peev el Ĉirpan, kiu prezentis sin por la meza grado, sed ricevis la plej altan.

En la historio de la bulgara esperantista movado tiuj ĉi kursoj estas la unua okazo, kiam granda grupo da esperantistoj (preskaŭ 60 homoj) restis kune duonmonaton, uzante la lingvon kaj ĝenerale vivante ĉe esperanta atmosfero. Kompreneble, ĉiuj partoprenantoj progresis en la lingvo — en la praktiko kaj en la teorio kaj estas kontentaj de tio.

La vivkondiĉoj en la tendaro ne estis sufiĉe bonaj (precipe en la komenco). Antaŭ ĉio oni planis akcepti 40 personojn, sed venis preskaŭ 60.

Dum nia restado oni metis tegmenton de unu negranda konstruaĵo, en la fino estis preta ankaŭ la nova kuirejo.

La loĝejoj en la vilaĝo estis malproksimaj kaj tio kaŭzis perdon de tempo. Ankaŭ la akvo ne estis proksime (cetere ĝi estas bonega kaj malvarma montara akvo). Ĉiu saĝa homo


pensus, ke 60 personoj ne suferus pro manko de akvo, se ĉiu alportus kelkajn litrojn ne ĉiutage, sed dum du, dum tri tagoj. Mi devas menci tiurilate k-dojn Nikola Mladenov el Sofia, Trajĉo Pamukĉiev el Asenovgrad, Stojan Popov, Stojan Jelezarov, Kina Uzunova, la malgrandan Veselin, kiuj multfoje alportis akvon. Sed multaj (precipe junuloj) ne emis fari tion, ne emis servi al si mem ĉe la tablo. Estis iuj, kiuj ne emis subiĝi al la kolektiva disciplino. Aliaj plej senpacience kaj malice esprimadis sian malkontentecon pro la malfacilaĵoj (precipe en la komenco), sed mi kredas, ke en la fino ĉiuj estis kontentaj de la kune pasigitaj 15 tagoj.

Dum la venonta somero la kondiĉoj en Druĵevo estos pli bonaj. La grupoj ne devas esti grandaj kaj tiam la rezultoj estos pli bonaj. La firma bazo estas metita. Kiam la partoprenantoj estos malpli, parto el ili loĝos en la proksimaj vilaĝaj domoj kaj la ceteraj en la tendaro mem.

La Kooperativo nun konstruas la akvokondukilon. Estas sendube ke la vivkondiĉoj en la Esperanto-tendaro „Druĵevo“ (Amikeco“) estonte senkompare plibonigos ol dum la kuranta jaro.

Sukceson al la Bulgara Esperanto-tendaro de la Amikeco!

Simeon HESAPĈIEV



Literatura esperanta rondo en Kluĵ — Rumanio

Hristo Smirnenski

KARL LIEBKNECHT

Memoras kaj memoros ĉiam lin Berlino
ĉen tiuj tagoj de tempesto kaj obstino,
milite kiam for
ekmarŝis regimentoj tra la bruaj stratoj
kaj enis ĉie nur solenaj paroladoj,
muzikoj kaj horor'.

Kaj tiam la demon' fajrspira de l' milito
tra tuta ter' flirtigis flagojn sen ekbrido
de sia granda fort'.
Blinduloj kondukataj de hienoj rabaj
flugadis furioze kaj tintigis sabrojn
tra l' nigra, sanga nokt'.

Kaj kiel monstro sangavida ekster kaĝo
Berlin' hirtigis en blindeco kaj malsaĝo
kaj ĉie kun rikan'
la grandajn siajn brakojn kun koler' ĝi svingis
vilaĝojn belajn, urbojn kaj komparojn igis
brulanta ocean'.

Sed en mallum' timiga de l' tempest' rabla,
samkiel ruĝa stelo torĉo ekradiis
kaj ĉie en flamar'
ektremis koroj turmentataj. Reviviĝis
esper' kaj super urbo klara vok' aŭdiĝis:
„Antaŭen, junular'!“

Vekiĝis tiam kun konsterno la bulvardo;
kaj super ĝi portiĝis granda ruĝplakardo,
kaj la sentima ar',
flirtigis la standardon de sia sang' hardita
kaj kriis kun kuraĝ': „Pereu la milito
kaj ĝia agentar'!“

Kaj sin demandis mirigite tuta urbo:
„Nu kiaj estas ĉi arogo kaj perturbo
kaj tiu brava fil'
potence kiu nun instigas junularon
kaj por si mem la morton tiel li preparas“—
Karl Liebknecht estis li!...

Berlin' memoras lin, kaj ĉiam lin memoros,
ĉar al malsataj masoj de l' laboro
fajrsignon faris li,
kaj forta eĥ' eksonis en la koroj ardaj
kaj en la stratoj flamis barikadoj
sub ruĝe-flaga stri'.

Ĝemadis hurle turnoventoj januara,
pro ties frosta spir' en koroj proletaraj
kolero ardis jam.
Kaj jen hirtigis en ribel' la maro sklava,
kaj estis ĝia voĉ' tempest' el pafoj
kaj pluv' el varma sang'.

Kaj estis tagoj, noktoj de bataloj krudaj.
Kaj disrompinte ĉenojn, jen la sklavo nudaj
ĝis lasta la minut'
ne tiris manojn for. Berlino en alarmo
formortis kolorita de l' ridet' malvarma
de tiu granda lukt'.

Sed ree raba Mort' malfermis nigran liston
por noti ene la heroajn spartakistojn.
Kaj en la vintra kri'
animo unu kiel suna helrideto
rebriis en ale' kaj mortis en sekreto, —
Karl Liebknecht estis li!...

Sed lin Berlin' memoras, ĉiam lin memoros
kaj vidos lin gvidanto de l' amasoj gloraj,
nun kiuj kiel ond'
kreskadas, tondras kaj la sklavaj ĉenojn ŝiras,
la fundamentojn pezajn skui jam aspiras
de tiu sklava mond'.

Aŭskultas sian ĉiutagan bruon nun Berlino —
Spartako staras brave super ĝi sen timo,
kaj tondras fajra kri':
— „Berlin', Berlin', jam vanaj estas ĉi esperoj!
Festenoj viaj estas ĝojoj efemeraj —
mi estas tie ĉi!”

„Vi vane min enfosis en la parkaleo,
venkinte mian morton mi vivadas ree
sur ĉiu via strat'!
Revokos mi al lasta ŝturm' la masojn tamen,
por vian fortikaĵon en triumf' ornamu
per la skarlata flag'!”

„Kaj se forbrulos en la lukt' la suno —
anstataŭ suno mia koro lumos
tra la malhela ster',
kaj la flamar' suffoĉos de la junanimoj
por rompi sen hezit' la lastan ĉenon fine
de la patrino-ter'!”

1921

Tradukis : *At. Lakov,*
Ĥristo Gorov—Ĥrima

LETEROJ AL NI

La 15-an de oktobro 1961

Kara kamarado

Mi jam estas hejme, sed miaj pensoj ankoraŭ ŝvebas super via bela lando. La impresojn, kiujn mi ricevis pri la vivo de via popolo estas neforgeseblaj. Nun mi kurage povas konfesi, ke mi estas preta interŝangi nian federacian registaron por ricevi la vialandan registaron. La kaŭzo pri tiu interŝanga preteco estas la sincereco kaj la insista batalo de via registaro por paco. La celo kaj la taskoj de nia federacia registaro ne estas honorindaj.

Vi certe rememoras nian interparoladon en hotelo „Balkanturisto“ dum mia restado en Sofio. Mi rakontis al vi diversajn epizodojn el la batalo de progresemaĵoj kontraŭ la militpreparoj de nia federacia registaro. Antaŭ nelonge kelkaj kamaradoj estis kondamnitaj de la tribunalo kaj malliberigitaj nur pro tio, ke ili malŝatas la militon kaj aspiras pri paco kaj progresema kulturo. Iuj el la kondamnitaj tuj post la juĝproceso estis enkarcerigitaj. La familioj de la kondamnitaj vivas en granda mizero.

Post kelkaj tagoj komenciĝas nova juĝproceso. Estos juĝataj nova deko da kamaradoj. La prokuroro diris al unu el ili, ke pro la streĉa situacio en Berlino ili devas esti garantiuloj. La proceso ankoraŭ ne estas finita. Pri tio mi raportos al vi aparte.

Mi preterlasis mencii, ke la konduto de la kamaradoj kondamnitaj dum la unua proceso estis kuraĝa. Ili ĉiuj fieris esti komunistoj. Kaj nun mi havas peton al vi. Ĉu vi havus eblecon organizi kunvenon en kiu vi diskonigus la enhavon de tiu ĉi mia letero. Ankaŭ estus bone, se vi kaj viaj amikoj povus sendi al la familioj de la jam kondamnitaj kamaradoj malgrandajn donacojn (nutraĵojn ktp). Ne multe, nur por montri solidarecon.

Kore vin salutas via germana kamarado: H. P.

* * *

Stockholm, la 15-an de Novembro 1961

Karaj Bulgaraj Gekamaradoj!

Antaŭ ĉio mi elkore dankas pro gastamo kaj helpemo, kiujn mi spertis en via bela lando dum du longaj vizitoj: la unua en Julio 1959 kaj la dua en Septembro—Oktobro 1961. Samtempe mi petas pardonon, ke mi ne skribis al ĉiuj, kiuj oferis tempon kaj monon por fari mian restadon kiel eble plej agrablan. Malsano kaj aliaj malfacilaĵoj malhelpis al mi.

Dum pli ol du monatoj mi havis okazon vivi inter bulgarioj, kaj sekve mi povis sperti la grandan valoron de Esperanto kiel helplingvo en ĉiutaga vivo. Sed mi ankaŭ plurfoje povis konstati, ke nia lingvo tre bone taŭgas por libere kaj facile pridiskuti specialajn temojn, ekz. pri literaturo aŭ scienco. Dum mia restado en Bulgario mi povis iom ripozi kaj trovi tempon por konatiĝi kun la enlanda Esperanto-gazeto Bulgara Esperantisto. Estas por mi granda ĝojo povante konstati, ke ĝi ne nur estas altvalora por la Esperanto-movado, sed ke ĝi nun ofte prezentas tre interesajn artikolojn pri la temo kiamaniere oni klopodas plibonigi la homan sanon. Pro tio ĝi meritas la atenton de la tuta mondo. Mi volas kapti okazon gratuli pro jam atingita alta nivelo de Bulgara Esperantisto kaj deziras bonan daŭrigon!

Simpatia flanko de Bulgara Esperanto-Movado estas ĝia progresema kaj kontraŭimperiisma karaktero. Ŝajnas al mi, ke tio simple estas la interna ideo de Zamenhof aplikita je nuntempa situacio en la mondo. Sekve mi deziras daŭran progreson kaj floradon de tiu movado kaj ĉion bonan al ĝiaj anoj!

GUSTAV NILSSON

B o n a n J a r o n a l n i a j l e g a n t o j !

ЗА ПРЕДСЕДАТЕЛИТЕ И КАСИЕРИТЕ

В бр. 7 на „*Bulgara Esperantisto*“ ние публикувахме инструкцията за отчитане на членския внос с новия опростен формуляр. Въпреки обаче опростяването на формуляра някои ръководства го попълват небрежно, правят груби грешки, с което затрудняват отчетността по движението на членския състав. А чрез тия формуляри ЦК на БЕС иска да знае, колко общо члена има през всяко тримесечие и колко от тях са отчетени. Без тия основни данни ние не можем правилно да водим организационната работа.

Какви основни грешки допускат ръководствата при попълване на формуляра?

1. Не попълват правилно тримесечието. Трябва да се пише тримесечието, за което се плаща членският внос, а не това, през което се плаща. Датата на записва, която се пише долу, е достатъчна, за да се знае кога е внесена сумата. За нас е по-важно да знаем за кое тримесечие тя е предназначена. Така някои дружества плащат за цяла година, а

пишат трето тримесечие. Те трябва на съответното място за тримесечието да напишат: I, II, III, IV.

2. С един формуляр не може да се отчита членски внос за различни периоди, напр.: 10 члена са платили за едно тримесечие, 15 за две тримесечия, 8 — за цяла година. Това създава объркване. Най-добре е дружествата да свикнат да отчитат всяко тримесечие в съответния срок — 10 число на последния месец от тримесечието, независимо от това, как то събира членския внос от членовете си.

3. Непременно трябва да се напише номерът и датата на записа или ордера. Без това формулярът е невалиден.

4. Формулярите се подписват от председателя и касиера и се печатват с дружествения печат. Някои касиери се изхитряват и подписват и двете места. Такива формуляри ще бъдат връщани.

Тук даваме два примера, как трябва да се попълват формулярите. Първият се отнася за отчетен членски внос за цяла година, а вторият — за четвърто тримесечие.

Есперантско д-во „*Verda Stelo*“
гр. (с.) *Стара Загора*
ул. Раковски 130

София, п. к. 66
До ЦК на БЕС

ТРИМЕСЕЧЕН ОТЧЕТ

за издължен членски внос

Тримесечие *I, II, III, IV* *) на 1961 г. Общо членове *103*.
От тях отчетени всичко *103* члена, както следва:

- а) с пълен членски внос *70* члена, по *12* лв. общо *840* лв
- б) с намален членски внос *33* члена, по *6* лв. общо *198* лв.
(учащи се и войници)

Всичко постъпил чл. внос в д-вото за *I, II, III, IV* тримесечие *1038* лв
50% от тая сума *519* лв. са внесени в ЦК на БЕС със запис
№ *135* от *30 май* 1961 г.

Касиер: *Митков*

Председател: *Ир. Чукова*

(печат)



Есперантско д-во „Prospero“
гр. (с.) София
п. к. 386

София, п. к. 66
До ЦК на БЕС

ТРИМЕСЕЧЕН ОТЧЕТ

за издължен членски внос

Тримесечие *четвърто* *) на 1961 г. Общо членове 126.
От тях отчетени всичко 92 члена, както следва:

- а) с пълен членски внос 84 члена по 3 лв. общо 252 лв.
б) с намален членски внос 8 члена по 1.5 лв. общо 12 лв.
(учащи се и войници)

Всичко постъпил чл. внос в д-вото за *четвърто* тримесечие 264 лв.
50% от тая сума 132 лв. са внесени в ЦК на БЕС с ордер
№ 324 от 8 декември. 1961 г.

Каснер: Ст. Христов

Председател: Г. Гаврилов

(печат)

* За кое тримесечие се плаща

FONDUSO „ESPERANTO-DOMO“ EN SOFIO

En la Asocio daŭrigas veni la kontribuoj
por la konstruo de Esperanto-domo en Sofia.
Sendis monon la jenaj Esperanto-societoj kaj
privataj personoj:

1. Tinka Lakova, Sofia	150 lv.	12. Ljuben Grozdanov, Sofia	50 lv.
2. Viktor Cenov, Sofia	330 lv.	13. Jordan Vojnov, Sofia	90 lv.
3. Mihail Langov, Sofia	95 lv.	14. Lazar Mladenov, Sofia	300 lv.
4. G. D. Petrov, Sofia	20 lv.	15. Metodí Pančev, Sofia	40 lv.
5. Krástju Karucin, Sofia	600 lv.	16. Kunčo Válev, Sofia	100 lv.
6. Dimitr Simeonov, Sofia	120 lv.	17. Stara Zagora, Esp. societo	370 lv.
7. Paska Noeva, Sofia	50 lv.	18. Dimitrovo, Esp. societo	251 lv.
8. Kiril Drajev, Sofia	50 lv.	19. Kubrat, Esp. societo	86 lv.
9. Evstati Cifudov, Sofia	100 lv.	20. Peštera, Esp. societo	100 lv.
10. d-r St. Moraresku, Sofia	50 lv.	21. Levskigrad, Esp. societo	148 lv.
11. Studenta societo „V. Peeva“	72 lv.	22. Samokov, Esp. societo	200 lv.
		23. Ivan Canev, Sofia	60 lv.
		24. Ruse, „Liberó“	10 lv.

Karaj gekamaradoj, al vigla laboro por ko-
lektado de novajn bonvolaj kontribuojn!

GEEDZIGO SMIRNOVA — GEORGIEV

La 3-an de oktobro k. j. en Moskvo, USSR
geedzigis la soveta esperantistino IRINA NI-
LOVNA SMIRNOVA kaj k-do VESELIN IVA-
NOV GEORGIEV, prezidanto de la Esperan-
to-Societo en vil. Pordim, Bulgario.

Al la nova juna esperantista paro niajn gra-
tulojn kaj varmajn bondezirojn.



Pazarĝik. Je la 9-a de novembro okazis la unua kunveno en la nova klubejo, akirita post grandaj malfacilaĵoj, dank' al niaj meritintaj samideanoj — la fratoj Sotir kaj Ivan Vasilev'oj. Enirante ĉi-vastan kaj luman kunvenejon, ni ĉiuj pazarĝikaj esperantistoj eksentis apartan ĝjon kaj fieron posedante propran klubejon. Ĉi tie denove eksonos la kara esperanta parolo kaj denove oni eksentos la proksimigon inter ĉiuj homoj en la batalo por la mondopaco. La klubejo troviĝas sur strato „Gurko“ 18, en la centro de la urbo.

Unue prelegis k-do P. Arnaudov pri la impresoj de la ekskurso tra Pollando kaj Ĉeĥoslovakio, kiujn vizitis ĉisomere 10 membroj de nia societo.

En la pridiskuto de la organizaj demandoj la kunveno decidis laŭ propono de k-do Cărcarov, ke ni kunvenu ĉiujnarde por perfektigi en la lingvo, preparante nin inde por la 35-a enlanda kongreso en Burgas en julio 1962 kaj por la 48-a Universala Kongreso en Sofio — 1963.

Oni decidis ankaŭ malfermi kurson por komencantoj kun kursgvidanto k-do Iv. Vasilev.

En sia parolo nia prezidanto k-do Iv. Vasilev kuraĝigis la partoprenon en la laborbrigadoj. Li menciis ankaŭ pri la sukceso de la bulgarlingva libro „La mondo havas internacian lingvon“ en Sovet-Unio. Laŭ propono de k-do Iv. Vasilev, la kunveno elektis por gazetkorespondanto de nia societo k-dinon R. Georgieva.

Rosica Georgieva

Ĉirpan. Laŭ la rekomendoj de la CK de BEA nia societo ĉi-jare, post bone organizita propagand-semajno, malfermis kurson por komencantoj, kiun partoprenas 16 geurbanoj, gvidata de Ivan Peev. Ĉar en sia plimulto la gekursanoj estas kun mezgrada kle-

reco, la lecionojn ili tre facile asimilas. La intereso pri Esperanto kreskas. En proksimaj tagoj komencos siajn okupojn la alia kurso — en la uzino „Bădeštnost“, kiun gvidos k-do Petăr Šoparov, Prezidanto de la societo.

Ĉi-loke ni esprimas nian koran dankon al la estraro de la regiona mal-sanulejo, speciale al ĝia ĉefo doktoro Dimităr Mălcanov. Li disponigis al ni la salonon (akceptejon) kun ĉiuj plej favoraj kondiĉoj por rezultodona laboro.

Ĉe la piedo de la monto Sredna Gora, nome en la „Ĉirpanaj altaĵoj“ oni konstruas grandan turistan domon. Konsciante, ke per nia aliĝo en la sociaj entreprenoj ni kontribuas por la konstruo de l'socialismo en nia lando, nia societo decidis fari laborbrigadon por la urĝa finkonstruo de la montodomo. Okaze de la datreveno de la Granda oktobra revolucio, la 6-an de novembro k. j., 20 geesperantistoj forveturis al la montaro. Dum la laboro la vet'ro malboniĝis, sed tio ne malhelpis nin: nia grupo, konsistanta el junuloj, faris bonan laboron. Per niaj sloganoj, per kiuj ni ornamis nian ŝarĝaŭton, per niaj esperantaj kantoj ni lasis bonajn impresojn inter la masonistoj de la montodomo. Ni esprimis deziron viziti ilin denove.

La estraro planas partopreni ĝis la fino de la kuranta jaro alian laborbrigadon. En proksima tempo oni komencas planton de arbaro en ĉirkaŭaĵoj de nia urbo. Per nia unuigita esperantista grupo, partoprenante tian socian iniciaton, per niaj nedisigeblaj de ni flago kaj sloganoj, ni kontribuas por la plivigliĝo de la movado.

Ivan Peev

LA PIONIROJ LERNAS ESPERANTON

Levskigrad. En la pionira domo ekfunkciis je la 9-a de oktobro k. j. pionira E-rondo „Mitko Pa'auzov“ kun gvidanto Neĉo Dermengiev. Regule partoprenas 30 infanoj.

Okaze de la tutmonda konferenco de la gvidantoj de la pioniraj domoj la pionira domo „V. Levski“ en Levskigrad sendis gratulotelegramon kun propono, ke oni malfermu E-rondojn en ĉiuj pioniraj domoj de la lando kaj en la lernejoj.

La intereso inter la gelernantoj pri la internacia lingvo Esperanto estas granda.

Nečo Dermengiev

KOLAROVGRAD. La laboristoj en la ŝtata maŝinkonstrua uzino en Kolarovgrad same kiel en ĉiuj aliaj uzinoj havas ĉiam antaŭvide la devizon: „Ŝparu la metalon!“ Tiu devizon zorge observas ankaŭ la esperantistoj tie laborantaj. Antaŭ nelonge al kamaradoj Marin Stoev kaj Ilia Jordanov oni komisiis la elaboron de bronza akstigoj. Dank' al la antaŭvideco kaj atenta laboro ili sukcesis produkti el ŝparita metalo 180 pecojn pli ol estis plante. Aplaudojn al la esperantistoj, konsciaj laboristoj!

Ilia Andreev

ESPERANTO EN LERNEJOJ

La Esp.-Societo kaj la Junulara Grupo en Vraca ankaŭ ĉi-jare organizis instruadon de Esperanto en la loka tekstila teknika lernejo. La lecionoj okazis dufoje semajne. La kurson gvidas k-do E. Daskalov — instruisto en la sama lernejo. La instruado dauros ĝis la fino de la lernojaro, do entute 60 lernohoroj.

Esperanto estas instruata ankaŭ en la lernejoj de urbo Mezdra. En la loka mezlernejo funkcias lernorondo por libervola lernado de la internacia lingvo kun 30 partoprenantoj. Al tiom da lernantoj oni instruas ankaŭ en la tekstila lernejo ĉe uzino „St. Dimitrov“.

INTERESA RENKONTO EN BURGAS

En oktobro, gasto al la esperantistoj en Burgas estis k-dino Edwarda Kominska el urbo Gdansk — Pollando. Kun la helpo de la loka junulara grupo oni aranĝis renkonton de la gastino kun la lernantoj kaj instruistoj de lernejo „Hr. Botev“. K-dino Kominska rakontis siajn terurajn travivaĵojn en la naziaj koncentroj de la morto. Dank' al la helpo de la lerneja direktoro k-do Naĉev kaj de la pionirestro k-do Prodanov la renkonto estis bone organizita kaj vekis grandan intereson. La lernantoj starigis multajn demandojn. Je la fino la lernantino Karamfilka Krăsteva donacis al la gastino fresajn florojn kaj salutis ŝin per la vortoj: „Ni, la bulgaraj pioniroj, ne memoras la teruraĵojn de la milito, tamen

bone sciis kion ĝi alportis al la homaro. Ni deziras vivi en paco kaj feliĉo. . . Vivu la bulgara-pola amikeco“. La ĉeestantoj longe memoras pri la interesa renkonto kaj iuj inter ili ekdeziris lerni la internacian lingvon.

Nikola Petrov

SOFIO. Solena festado okaze la dudekjara datreveno de la mortigo de la komunisto-esperantisto Nikola Ŝopov estis organizita la 16-an de novembro en la salono de la Societo „Maksim Gorkij“. Malantaŭ bukedoj de vivantaj floroj sidis la blankhara, sed ĉiam vigla kaj energia patrino de Ŝopov kaj lia fratino. K-dino Trajana Petkova raportis per ardaĵ vortoj pri la vivo de la pereinta heroo, estinta sekretariino de la laborista sekcio de la esperantistoj dum la faŝistaj tempoj. En la belega poemo „Tom“ k-do Asen Grigorov majstre pripentris la spiritan portreton de Nikola Ŝopov, lian komunan restadon en la malliberejo kaj la fina entuziasma ribela kanto. . . de Ŝopov kaj liaj kamaradoj en la vizaĝo de la policistoj je la fatala momento antaŭ la pendigo.

Varian muzikan programon plenumis la virina kvarteto ĉe la Nacia opero kaj la vira okteteto ĉe la Armea ensemblo. La festadon ĉeestis k-dino Rosa Skolnik el Argentino.

Stefan Kadiev

La Medicina Sekcio ĉe Bulgara Esperantista Asocio ricevis regule la trimonatajn programojn pri la kunvenoj dum la kuranta jaro de la Sekcio de la Medicinistoj-Esperantistoj ĉe la Centra Domo de la Kulturo en Moskvo, USSR, kiuj okazigas merkredajn kaj dimanĉajn Esperanto-aranĝojn.

Dum la merkredoj oni gvidas rondet-lectojn de Esperanto.

Dum la dimanĉaj kunvenoj estas farataj prelegoj pri diversaj medicinaj demandoj.

Aktive partoprenas en tiu agado Prof. S. S. Ĉahotin, docento E. T. Salnikov, akademiano E. A. Bokarev, d-ro K. A. Lavrentiev ka.

La kunvenoj okazas de la 19 ĝis 22 h. Eksterlandulaj gastoj estas konsiderataj kiel plej afable invititaj — Moskvo, str. Hercen 19, trolejbuso: 5, 8, 15, 31 — aŭtobuso 107, telefono № 9-65-92.

BONVOLU KOREKTI!

En „Bulgara Esperantisto, 1961“, n-ro 2-a, paĝo 10, kolono 1-a, alineo 2-a de malsupre devas esti: „La perdo de labortagoj pro malsano (por kuracado de gripo) estis meze 1,5—2 foje pli granda ĉe la malsanuloj neraditaj.“

En n-ro 7-a, paĝo 9, la titolo devas esti: „Pasis kvardek jaroj“.

En n-ro 11-a, paĝo 7, en la komenco devas esti: „Vespero super domĝarden“. . .“

La Redakcio



JAMBOL. La 28-an de septembro k. j. en la klubejo de la Esp. societo „Maksim Gorki“ okazis kunveno je la ĉeesto de 65 geesperantistoj. K-do D. Trudoljubov — prezidanto de la societo raportis pri la nuna internacia politika situacio. Ĉiuj ĉeestantoj unuanime esprimis sian maltrankvilon pro danĝero de atombomba milito. „Ni, esperantistoj en Jambol kaj en nia lando devas ĉiurimede defendi la pacon“; labori por la bona kaj feliĉa estonto de nia popolo“ — finis sian raporton k-do Trudoljubov.

Tute speciale pri la germana problemo raportis k-do G. Jordanov — membro de la distrikta komitato de la Komsomolo.

La kunveno akceptis rezolucion poste sendita al CK de BEA, al la ambasadorejo de GDR en Sofia kaj al la pacdefenda komitato en Orienta Berlino.

La 12-an de oktobro, denove la klubejo de la societo estis malgranda por la multnombraj vizitantoj de la kunveno. K-do Trudoljubov parolis pri la signifo de la XXII-a kongreso de KP de Sovet-Unio. La kunveno sendis saluttelegramon al CK de la KP kaj al la Ministra konsilantaro de USSR.

**Spas Kănev
Petja Kraĉeva**

VIDIN. La 19-an de oktobro k. j. la Esp.-societo „Espero“ malfermis kurson de Esperanto. Ĉeestis la Prezidanto de la urba komitato de la Patrolanda Fronto, k-do Ignat Nikolov. Li salutis la kursanojn, bondeziris sukcesan laboron kaj substrekis, ke Esperanto povas ludi gravan rolon en la kultura interŝanĝo de la homoj. Dudek junaj gekursanoj entuziasme komencis la lernadon.

Dank' al bonvolo de la Prezidanto de la Komitato por Bulgara-Soveta Amikeco, la kurso funkcios en tre komforta ejo. La estraro de la societo „Espero“ publike esprimas sian dankon.

Georgi Simeonov

LEVSKI. Nova kurso de Esperanto estas malfermita por 25 geĉivitanoj. La kurson gvidas k-dino Donka Gavrailova — sekretarino de junulara organizaĵo. Ŝi partoprenis ĉi-jare la kurson por kursgvidantoj en v. Drujevo. Grava malhelpo estas la manko de lernolibroj.

La 11-an de novembro gekamaradoj el Esp.-societo „Trumpetisto“ en Levski kaj lernantoj de la muzika grupo gastis en vilaĝo Ŭmarevci kaj organizis en la loka lernejo propagandan vesperon kun riĉa muzika programo. Prelegis k-do Bejko Markov. La programon partoprenis d-ro Belĉev, A. Slavova, Ljudmila Ĝekova kaj aliaj lernantoj, orkestro kaj horo. Je la fino la ĉeestantoj amuziĝis kaj dancis. La vespero celis instigi la lernantojn en la vilaĝo lerni Esperanton,

Kina Uzunova

RUSE. Dum unu el la lastaj regulaj semajnaj kunvenoj de Esp.-Societo „Libero“ la Prezidanto k-do D. Kolarov prelegis pri la problemo de Berlino. Li substrekis la neceson baldaŭ subskribi packontrakton kun Germanio por tiel likvidi la nunan danĝeran kaj nenormalan situacion en la koro de GDR. Okcidenta Berlino devas esti libera senarmigita urbo. La ĉeestantoj aplaudis la detalan raporton de la prezidanto kaj laŭ lia propono voĉdonis telegramon al la packomitato en Berlino.

La 15-an de oktobro k. j. dimanĉe posttagmeze en la salono de Komsomolo la urba Esp.-Societo „Libero“ aranĝis la tradician solenan malfermon de la nova lernejo. Antaŭ la novaj gekursanoj el la urbaj kursoj tiuj el la mezlernejoj parolis la studento Momĉo Momĉev malfermante la solenaĵon. K-dino M. Preslavska tre interese prelegis pri la signifo de la internacia lingvo kaj la sukcesoj de la Esp.-movado en nia urbo. Ŝia prelego estis trafe verkita kaj tre efika speciale por la novaj esperantistoj. Salutojn kaj bondezirojn al la novaj kursanoj direktis ankaŭ la Prezidanto de la societo. La lernantino Denka Sopova ĵus reveninta el vojaĝo tra Germana Demokratia Respubliko rakontis siajn impresojn pri tiu lando kaj esprimis sian ĝojon ke dank' al la internacia lingvo ŝi sukcesis realigi interesan vojaĝon. Sekvis dancamuzo kaj interkonatiĝo.

Boris Kavalĝiev

LA III-a TUTLANDA ESPERANTISTA JUNULARA BALO OKAZOS EN RUSE

Taksante la fruan inviton de la esperantistoj el Ruse kaj la opiniojn de la plimulto el la junularaj grupoj en la lando, en unu el siaj lastaj kunsidoj la Estraro de la Junulara Sekcio ĉe BEA decidis okazigi la III-an tutlandan junularan balon en Ruse, je la 7-a kaj 8-a de aprilo 1962. Pli fruan aranĝon malfavoras la aparte malvarma klimato de la regiono.

La junaj esperantistoj el Ruse havas la ambicion organizi modelan renkontiĝon. Jam estas elektita loka organiza komitato konsistanta el reprezentantoj de la loka Junulara grupo kaj ĉiuj societoj en la urbo, entute 16 personoj sub la prezido de k-do Momĉo Momĉev. Nun oni esploras la eblecojn pri enloĝigo de la gastoj, pri salono ktp. La provizora programo antaŭvidas, sabate vespere, junularan balon kun dancoj, ludoj kaj surprizoj. Dimanĉe okazos oratora konkurso, diskutado pri anoncota temo kaj ekskursoj tra la apudlanda urbo.

En la sekvonta numero de „Bulgara Esperantisto“ vi trovos plurajn informojn pri la kotizo, la altĝkondiĉoj kaj aliaj detaloj.

LA MONDO HAVAS INTERNACIAN LINGVON

Ne delonge aperis en bulgara lingvo la broŝuro „La mondo havas internacian lingvon“. La aŭtoroj starigis al si la taskon en malgranda laŭ amplekso kaj riĉa laŭ enhavo verko, doni taŭgan kaj valoran materialon pri la problemo de internacia lingvo kaj ĝia solvo per Esperanto. Tiun taskon la aŭtoroj bone solvis.

La libro enhavas antaŭparolon de la fama bulgara literaturisto prof. Petro Dinekov kaj 15 ĉapitroj pri diversaj temoj.

En la diversaj partoj de la broŝuro bone kaj majstre estas sistemigita tre riĉa fakta materialo. En la unua ĉapitro „La internacia lingvo nun“ oni rakontas pri la faktoj, kiuj elvokis la bezonon pri internacia lingvo kaj kiuj lingvoj en diversaj historiaj momentoj parte plenumadis la taskon de tia lingvo. La vivo montras, ke la vivantaj lingvoj ne povas plenumi la taskon de mondkomprenilo. Oni konkludas, ke nur artefarita lingvo povos plenumi la taskon de helpa internacia lingvo.

En la ĉapitro „La internacia lingvo tra la jarcentoj“ oni rakontas pri la historio de la problemo, pri diversaj sensukcesaj provoj ĝis la ĝenia solvo de tiu problemo per Esperanto.

En la ĉapitro „Esperanto — la internacia lingvo de nia nuntempo“ oni prifraktas la lingvon kiel socia fenomeno, oni komparas Esperanton kun la aliaj lingvoj kaj argumentite oni montras ĝian taŭgecon kaj avantaĝojn.

En la ĉapitro „La scienco kaj la internaci lingvo“ oni prifraktas la problemon pri la utilo, kiun alportus al la scienculoj la akcepto de komuna internacia lingvo. Oni montras la rilatojn de diversaj sciencistoj al la problemo kaj speciale al Esperanto, de diversaj kongresoj, konferencoj ktp., de diversaj organizaĵoj, inkluzive la rekomendoj de UNESKO.

En la ĉapitro „Esperanto en la lernejoj“ estas tuŝita la historio de instruado de Esperanto en la lernejoj, ĝia instrua kaj eduka signifo.

En la ĉapitro „La belarta literaturo en Es-

peranto“ oni traktas la tradukan literaturon kaj ĝiajn avantaĝojn kompare tiun en aliaj lingvoj. Riĉenhavaj nomaroj de traduka kaj originala belarta literaturo okupas kelkajn paĝojn de la verko.

En la ĉapitro „Esperanto en la vivo“ la aŭtoroj rakontas, kiamaniere oni utiligas praktike la lingvon; pri UEA; pri la apliko de Esperanto en turismo, komerco, radio, transporto, poŝto kaj telegrafo ktp. Ĉio ĉi pruvas, ke Esperanto estas taŭga rimedo en la ĉiutaga vivo de la homaro. Ĉi tie oni montras la esperantajn periodaĵojn aperantajn en la tuta mondo.

En la ĉapitro „La tutmonda Esperanto-movado“ en tre konciza formo ampleksanta iom pli ol 17 paĝojn, la aŭtoroj sukcesis rakonti pri la movado kaj ĝia historio en multaj landoj de la mondo.

En la ĉapitro „Petskribo pri la internacia lingvo Esperanto“ la aŭtoroj donas la tekston de la petskribo al la Organizaĵo de la Unuigintaj Nacioj kaj la procedon, ĝis kiam UNESKO faris sian deklaraĵon favoran al Esperanto.

En la ĉapitro „Esperanto unuigas la popolojn en ilia batalo por paco kaj amikeco“ oni montras, kiamaniere Esperanto kontribuas en la batalo por defendo de la paco kaj kreo de amikeco.

Post la lasta ĉapitro oni donas nomaron de la Esperanto-societoj en Bulgario.

La libro vere estas tre riĉenhava kaj per sia abundeco de fakta materialo prezentas kvaŝaŭ malgrandan esperantan enciklopedion. Ĉiu sukcese povas utiligi ĝin por la propagando de Esperanto en diversaj sociaj medioj.

Pri la aŭtentikeco de la fakta materialo mi ne parolos, ĉar mi ne havis eblecon fari la necesajn esplorojn. Krom tio, mia tasko estas pli modesta, mi nur esprimas mian impreson pri la donita materialo.

Estas enlasitaj kelkaj faktaj ciferoj. La asocia organo „Bulteno“ reaperas ne en 1956, sed en 1955. „Bulteno“ estis rebaptita en „Bulgaran Esperantiston“ ne en 1958, sed en 1957 (p. 81).

Iv. CANEV

REDAKTA KOMITATO

Canko MURGIN (respondeca redaktoro), Atanas LAKOV, Ivan SARAFOV,
Kiril DRAŬEV, Simeon D. SIMEONOV, Violin OLJANOV

Korektis: P. Georgieva

Formato 71×100/16

Eldonkvanto 3000 ekz.

Adreso: Bulv. Dondukov 57, Tel. 7-46-01, Sofio, Poŝtkesto 66

Ŝtata presejo „T. Dimitrov“, filio 2 — Sofio; mendo № 7626/61

DEZIRAS KORESPONDI

- BULGARIO, Kjusten'dilsko, vil. Dolistovo — Nikifor Nikolov Zašev pri terkultura koop. vivo per L. kaj PK.
- BULGARIO, Plovdivsko, vil. Paničeri, Todor Cokov Dringov kun ĉiuj landoj per L. kaj II. P K.
- VIETNAMIO, Nam-Dinh, 17 d — Khu-Gia-Dinh-Dêt, s-ro Doan-cong-Tinh (lernanto 18-jara).
Nam-Dinh, Y-Yên, Lop 8, Truông Cáp III, s-ro Vũ-Ngoc-Thach (lernanto 16-jara).
Nam-Dinh, Nha-May-Diên, Vũ-Hóa, (jaboristo 23-jara) kun junuloj pri ĉiuj temoj.
- KOREO, Pjeng-Jang, K. E. A, P. O. Kesto 16, Bak Cun-Hjeng kaj interŝanĝi esp. librojn, il. p. k. kaj aliaj esperantaĵojn.
- HISPANIO, Mieves—Asturias, str. La Rozo 6—10, Emanuelo Ardura, kun bulgarinoj per L. kaj II. P K. Preferas naciajn kostumojn, pejzaĝojn kaj esp.-revuojn.
- ĈINIO, Chejiang-Hangchou, Ĥusû Dafufan 135, k-do Hin Liang Ĉen 26 jara, instruisto, interŝ. poemojn, nac. rakontoj, prozo, popolantojn.

- Provinco Ŝensi, Tunĉuan, Water woks (Vodoprovodnaja stancia), Ĥanŝif — 21-jara inĝeniero, pri filozofio, literaturo ktp. Ankaŭ kun bulgaroj, laborantaj en la sama fako.
- BRITUJO, Kent, West Wickham, Langley Way, 172, Bromley Young Esperanto Klub deziras multajn korespondantojn por 13-ĝis 17 jaraj gejunuloj.
- SUOMIO, Salo, Sepänk. 7, Pekke Grönroos, junulo deziras korespondi kun gejunuloj 17—22 jaraj.
- D. D. R. — Dresden, Bez. Freital II, Bergstr. 32, Walter Arnold interesŝanĝas bildkartojn kaj gazetojn.
- ITALIO — Sciacca, (Agrigento) Corso Vittorio Emanuele 125, Anselmo Diliberto kun fraŭlinoj.
- SVEDUJO — Ljungby, Box 19, Erik Johansson kun sinjorinoj (30—60 jaraj).
- POLLANDO — Zielona Gora, Slava placo 6, Dom Studenta, por Zdislav Blazejczyk—Studenta esperanto rondo dum januaro aranĝos ekspozicion de PK, PM, esp. revuoj, libroj kaj aliaj esperantaĵoj. Ĉiu sendinto ricevos koloran, bele afrankitan PK el alia urbo ŝtampita per kvar diversaj esp. ŝtampiloj.
- POLAVNDO — Pow. Dzierzoniow, p-ta Pieszycze, Piskonów 20, Crestav Niedrweđ kun geknaboj.

„BULGARA ESPERANTISTO“

aperos dum la nova jaro tre regule kun varia enhavo: informoj pri la enlanda kaj la internacia Esperanto-movado, sciigoj kaj direktivoj de CK de BEA, versaĵoj, rakontoj, raportaĵoj, fotoj el nia vivo, karikaturoj, humoraĵoj, distraĵoj, lingvaj demandoj, paĝo por la komencanto, kolono de la leganto k a.

Tuj abonu kaj abonigu vian amikon kaj korespondanton! „Bulgara Esperantisto“ prezentas tre bonan donacon por eksterlandaj esperantistoj.

Utiligu la rabaton ĝis la fino de decembro — 12 levoj. Post tiu dato — 14 levoj.

La duonjara abono estas ĉiam 7 levoj.

Por eksterlando 20 levoj aŭ 2 usonaj dolaroj.

Por Albanio, Ĉeĥoslovakio, Hungaro, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 16 levoj.

La monon sendu per poŝtmandato al BEA, poŝtkesto 66, Sofio.

